

## EUGENIUSZ BODO

*Malgaja finiĝo de la vivo de la pola aktoro de distraj teatroj kaj de la pola filmo en la dumviva periodo, kiu ĝuis grandegan aprobon kaj popularecon dum preskaŭ tuta sia vivo.*

Post la atako kontraŭ Sovetunio (la 22-an de junio 1941) fare de la hitlerana germana armeo, pri la vivo de Bodo (pseŭdonomo de Bogdan Eugène Junod) ne plu estis akireblaj de liaj teatro- kaj kino-aktoroj seriozaj sciigoj.



En la bele kaj tre zorgeme prilaborita monografio de Iwona Kienzler: „Bodo, jago burzliwé romanse“ (Bodo kaj liaj multaventuraj amromanoj) ni legas:

Post la jaro 1989 en la agadon por determini la misteron pri Bodo, ekinteresiĝis ankaŭ lia perencino Vjera Rudź, turninte sin pri tiu ĉi afero al ĉiuj, kiuj povus helpi, komencinte de la Internacia Ruĝa Kruco, helpe de la tiama Rusia prezidento Boris Jelcin, kaj fine pere de Lech Wałęsa. La misteron finfine klarigis la Rusa Ruĝa Kruco, al kies laborantoj prosperis determini, ke Bogdan Eugène Junod, la svisa civitano, mortis la 7-an de oktobro 1943 en la lagro (puntedaro) en Kotlas proksime de Arĥangjelsk.

La dokumento afirmanta lian forpason oni sendis al la pola flanko kune kun foto de la aktoro, farita nelonge antaŭ lia morto.

Al la foto estis kromdonita la dokumento kun jena enhavo: Ĵano – Bodo Eugeniusz Bogdan naskita en la jaro 1899, la filo de Teodor, laŭfake aktoro, reĝisoro. Li estis arestita la 26-an de junio 1941 decide de la speciala konsilio de NKVD de Sovetunio, kondamnita je kvinjara eduka restado en puntendaro (lagro) kiel elementulo socie danĝera. Al la punmallibero li subiĝis en la malliberejo Butirki en Moskvo, en la urbo Ufa kaj en la Arĥangjelska regiono. Li mortis la 7-an de oktobro 1943. Surbaze de la 3-a artikolo de la leĝo de Ruslanda Federacio pri la Rehonorigo de la Viktimoj de la Politikaj Reprezalioj el la 18-a de oktobro 1991 la supremenciito estis rehonorigita.

Sur lagra foto la faman amanton de la pola kino oni povis rekoni sole laŭ liaj okuloj. Sur la foto oni vidas malgrasiĝintan malliberulon kun razita preskaŭ kalve ulceroza kapo kun kovrita per hararo vizaĝo. Rigardante la foton ni devas konsenti kun alia, iomete aliel rakontata raporto pri Bodo fare de Aleksandro Feiner, kiu asertis, ke la kaŭzo de la morto de la aktoro estis pelagro kaj malsato. Pelagro, nomata ankaŭ lombardia ruĝumo, estas la malsano de la haŭto aperigita pro la manko de vitamino B3 aŭ vitamino PP, kaj la nomo de la malsaniĝo devenas de la latina termino *pellaagra*, t.e. raspa haŭto, kies disvolviĝon faciligis la kondiĉoj, en kiuj ĉe la vivofino troviĝis la aktoro, atakas ne nur la haŭton, sed ankaŭ la centran nervosistemon kaj ankaŭ la digestan kanalon, kaŭzante la inflamon de la mukozoj, naŭzon, vomadon, diareon, ekscitiĝemon, perdon de la memoro kaj ĝeneralan apation. Al ĝiaj simptomoj oni povas alkalkuli la fortan ŝvelaĵon kaj vezike-tojn, kaj la atakitaj per la pelagro sferoj de la haŭto estas submetitaj al la escepte dolo-regaj infekcioj. Ni nur povas imagi, kion

sentis la viro, konsidetata iam esti la ikono de la eleganteco, zorganta pri si mem eĉ ĝis troigo, kiam li vidis, kion ĉi tiu perfida malsano faris al lia korpo.

Post kelka tempo aperis ankaŭ la homo, kiu estis la atestanto de la lastaj tagoj de Bodo. Tiu ĉi homo estis profesoro de muzikologio Alfred Mirek, kiu trafis al la malliberejo Butirki en la aĝo de apenaŭ dek naŭ jaroj kiel „la filo de la popola malamiko.“ Li estis loĝigita en la multpersona ĉelo, kie lian atenton kaptis viro, konsiderita de Mirek esti alilandano. „Pri tio, ke li estis alilandano, atestis ĉio: lia sinteno, manieroj, eduko, aspekto.“ Lian atenton igis la fakto, ke li neniam demetis mantelon, tiel, kvazaŭ tiu ĉi parto de la vestaro havus por li iun specifan signifon. „En la

ĉelo li estis soleca, forpuŝita. Kun li neniu interparolis. Tiam ĝi estis ege danĝera. Oni povus ricevi iun kroman paragrafon, pro la kontaktiĝo kun alilandano,“ – membris Mirek. Sed la junan homon io tiris al la mistera viro, kies vizaĝo ŝajnis al li esti konata. Nenio mirinda. Li vidadis ĝin pli frue sur la arĝenta ekrano, tiu mistera viro estis ĝuste Bodo.

Ne atentante la malliberejajn pliseverigojn, Mirek ekamikiĝis kun la kunulo de la malbonto, kiu simile al li estis Polo. Kiam li sciigis, kun kiu li rilatas, li ne kaŝis sian mirkonsternon, kaj la konato el la ekrano, kaj nun el la tendara tabullito, rakontis al li sian historion, kiun la profesoro ripetis post jaroj. „En junio 1941 en Lwów (Lvovo, nun Ukrainia Lviv) – rakontis Bodo – alpaŝis al mi du uloj. Ili proponis, ke mi min vestu kaj veturu kun ili. Mi estis konvinkita, ke ili volas min savi kontraŭ germana okupacio. Mi ŝercis, prenis la mantelon kaj ĉapelon.

Ni enaŭtomobiliĝis kaj rapidegis senhalte por eliĝi el la okcidenta Ukrainio. Ni haltis nur vespere en iu granda urbo. Ili fermis min en garaĝo de NKVD, kaj ili mem iris manĝi kaj ĝissate dormi. Matene ili aperis tute aliĝitaj. La antaŭan tagon ili estis forkurantaj kiel leporoj, nune, plensataj kaj rozkoloraj survizaĝe reprezentantoj de la granda soveta ŝtato. Ili min traktis kiel aeron. Dum tiu nokto mi trinkis nur kranan akvon. Ni rapide veturis al Moskvo. Ili veturigis min al Butirki, kaj ĉi tie mi tiel jene troviĝas.“

La aktoro ne sciis, ke la pola ambasadoro klopodis pri lia liberigo, bedaŭrinde senefike. Por Rusoj Bodo ne estis Polo, sed Svislandano, kaj pro tio ne validis por li la amnestio por polaj civitanoj, deklarita post la

konvencio Sikorski – Majski en la jaro 1941.

Mirek senpove observis, kiel la pelagro faras detruigon en la organismo de lia kunulo de malbonto, kiu penadis trompi la malsaton trinkante grandan

kvanton da akvo kun salo, kio eĉ pli profunde malbonigis lian sanstaton.

Bodo gradon post grado faladis en deprimon, kaj dum longaj tagoj li estis kuŝanta sur la tabullito katalapsia. La malliberejaj kunuloj disiĝis komence de aprilo 1943, kiam Mirek estis sendita al lagro (puntendaro). Ĉe la adiaŭo li donacis al Eŭgeno Bodosian por pano saketon. Tiu rekompencis al li per la alia originala donaco: „Li deŝiris el la mantela substofa kvadrato, eltiris el la viŝtuko fadenojn, prunteprenis de iu dikan, per la mallibereja rimedo faritan kudrilon, kaj envolvinte la randojn, subkudris ilin. Tiel fariĝis la naztuko. Ĝi estis ĉio, kion li povis al mi oferi.“

Post dekelkaj monatoj en lagro Mirek



*Lasta ekzistanta portreto de Bodo*

sciiĝis, kia sorto renkontis lian amikon. Iu el la malliberuloj asertis, ke li estis atestanto de la morto de la aktoro, sed lia raporto diferencas de tiu, prezentita de Aleksandro Feiner.<sup>1</sup> Mirek asertis, ke Bodo estis en tre malbona stato, kiam oni lin enaŭtomobiligis, kaj li estis veturigita kun aliaj malliberuloj al la fervojstacio, kie oni enrajnigis ilin kaj veturigis al lagro orienten. „Kun granda malfacilo subtenata, kaptante la tenilojn de la

mallibereja aŭtomobilo, li sukcesis transiĝi enen. Nek la mantelon nek la ĉapelon li tiu-momente havis.“ Kiam la transporto atingis la celitan lokon, la aktoro jam estis en agonio. Estas eble, ke li ne plu estis viva, kiam oni suprenlevis lin, el la per urino kovrita planko, por transporti lin al la puntendara hospitalo, kie oni konstatis lian forpason. La korpon de la aktoro oni ĵetis en la komunan tombon.

<sup>1</sup> *Aleksander Feiner, loĝanto de Novjorko skribis jenon: „Bodo mortis en la soveta lagro la 24-an de decembro 1943. La lagro nomiĝis Peresilnij Punkt n-ro 1 kaj troviĝis en Boltinka proksime al Kotlas, arĥangelskaja oblastj. Kaŭzo de la morto estis pelagro kaj malsato. Mi pri tiuj faktoj scias, ĉar mi ankaŭ tie estis – kaj mia patro Leon Feiner, mortis en la sama tago sur la najbara tabullito.“*

### ***Mia komentario al la persono de Bogdan Eugène Junod (la teatra kaj kina pseŭdonomo: Eugeniusz Bodo)***

Bodo (Bogdan kaj Dorota – baptonomo de lia patrino de domo Dylewska) naskiĝis la 28-an de decembro 1899 kiel filo de devenanta el la pola nobelaro loksidanta en Mazovia regiono de Pollando kaj la patro Teodor Junod de protestantisma konfesio. Dum la franca revolucio, kiu komenciĝis en la jaro 1789, liaj antaŭuloj trovis la azilon en Svislando. La patrino de Bodo, katolikino, edziniĝis al protestantisma konfesano kaj ŝi permesis, ke ŝia filo estu edukita en la konfesio de la edzo. Tamen la monografio nenion mencias pri la religiaj praktikoj de Bodo. Estas videble, ke li neniam al kiu ajn konfidis pri siaj religiaj praktikoj, ankaŭ pri siaj amikinoj. Nur estas skribite, ke liaj koraj amikinoj, aktorinoj, pri kiuj li precipe

zorgis estis nur kelkaj. Pri lia lasta amikino devenanta el Polinezio la aŭtorino de la monografio mencias, ke Bodo estis devigita ŝin „adiaŭi“ pro ofta uzo de la alkoholo, kion ŝi komencis fari en Usono, kiam ŝi estis aktorino de la amerikaj filmoj. Bodo malamegis la alkoholon.

Min interesas nur unu afero. Kiel Dio traktas tiujn, kiuj estas kristanaj kredantoj, tamen separataj de la Katolika (Ĝenerala) Eklezio, kies vera kreinto estas rekte Jesuo. Li ja estas ankaŭ Ĝia patrono kaj superulo. Ni tamen esperu, ke Justa Dio juĝinte lin, konsideris liajn antaŭmortajn suferojn kaj permesis al li pere de la purgatorio eniri la eternan spacon de la perfekta Amo kaj Ĝojo.

Esperantigis kaj prilaboris Andrzej Kler,  
Nuneaton, Anglujo